

juna amiko

Novembro, numero 91/4 (59). 18a jaro.

INTERNACIA LERNEJANA ESPERANTO-REVUO

songo

**La luno subiras oriente,
La suno levigas okcidente.
Kontraŭflue songa klipero
Navigas en tempa rivero.**

**Sonas venta violonĉelo
Obtuze post sopira velo.
Mi revenu al infaneco
Kun profundega tenereco!**

**Franjoj,
ni kantu infanan terceton,
Fraĉjoj,
ne kaŝigu en l'arbaro!
Panjo,
donu ankaŭ al mi korbeton,
Paĉjo,
aliĝu al nia aro!**

Feng Da-Qing, Ĉinio



Tiu ĉi foto prezentas scenon antaŭ 35 jaroj. La etulo estas mi kaj la etulinoj miaj fratinoj. La tempa magiisto ŝanĝis mian aspekton (vidu mian freŝan foton en numero 90/3 de *Juna amiko*) sed ne mian amoplenan koron. La foto ofte vekas miajn tenerajn rememorojn pri mia infanaĝo, pri miaj tiamaj gepatroj, tri fratoj kaj du fratinoj. Kiel bone, se tempo povus inverse flui sub la leviganta okcidenta suno!

SAKOJ DA PAKOJ

Ne nur Sankta Nikolao kaj Paĉjo Kristnasko trenas pezajn sakojn en la nuna sezono. Tuj antaŭ kaj tuj post la verko de ĉi tiuj linioj, ni trenis kaj trenos sako-plenojn de la tria numero de nia revuo al la poŝto, kiu distribuos ilin al pli ol kvindek landoj de la mondo: por scii pli precize kien, vidu la imponan statistikan liston en ĉi tiu numero.

Kial la hasto fermi la kvaran numeron, dum ni staras ankoraŭ ĝisgenue en ekspedendaj gazetoj? Nu, la jarfino estas unuflanke sezono de ĝojo kaj festado, ĝi ankaŭ estas la signalo por altigo de la poŝtaj tarifoj — je ĉ. tridek procentoj. Ni esperas je rapida laboro de la presejo, tiel ke ni povu Nikola-umi la kvaran numeron al poŝtejoj en la lastaj sekundoj de validigo de la nunaj tarifoj. Feliĉe, last-sekunde alvenis la freŝaj bildoj de Pavel Rak: pasint-numeran faston kompensas ĉi-numera festo! Ne pli da ruiniĝintaj ranoj!

Kaj kio okazis al la bildoj por la tria numero? Nu, tiu registrita letero faris unu-monatan urban ekskurson tra la kvartaloj de Prago antaŭ ol reveni al la sendinto. Kaj tamen, la poŝto aŭdacas tiom altigi la tarifojn! Duafoja sendo ja sukcesis, sed, kiel dirus nederlandanoj: 'mustardo post la manĝo.' Ni aperigos ilin iam ie, ekzemple en *Monato*, kies junularan paĝon redaktos ekde januaro la redaktoro de *Juna amiko*. Do, ne miru, se kontribuado por *Juna amiko* subite (aŭ malsubite) aperos en *Monato* aŭ inverse. *Monato* celas iom pli aĝan junularon ol nia gazeto, kaj povas toleri iom pli longajn kontribuojn.

Do, agrablajn jarfinajn festo-tagojn, ĝuu ĉi tiun numeron: igu viajn instruistojn TUJ resendi la enketilon el 91/3, se ili ankoraŭ ne faris. Kaj varbu por ni multajn abonantojn por 1992, kiu denove estos malfacila jaro por nia revuo, kiu tamen persistas aperadi!

Ĉu Kreda Troe?

Ĉiukaze Redaktore,

Stefan MacGill

2 dec 91.

Juna amiko, revuo por lerne-
janoj kaj komencantoj. Eldonas:
Hungara Esperanto - Asocio.
Administras, ekspedas, subtenas:
Internacia Ligo de Esperantistaj
Instruistoj (ILEI)

Aperas kvarfoje jare: februara,
aprilo, septembro, novembro.

Redaktoro: Stefan MacGill.

Adreso de la redakcio: pf.
193, H-1368 Budapest, Hungario.

Abonprezo en Hungario ĉe
HELIR: 120 ft. (por eksterlandano
144 ft.) Internacie ĉe UEA: 12,00
gld. Perantoj en 30 landoj. Legata
en kvindek.

Anoncoj:
Kvaronpaĝo: 300ft enlande
aŭ 30gld aŭ 3 jarabonoj en aliaj
okcidentaj valutoj.

Duonpaĝo: 500ft aŭ 50 gld.
aŭ 5 jarabonoj.

Tuta paĝo: 700ft. aŭ 70 gld.
aŭ 7 jarabonoj.


Nemzetközi eszperantó diáklap. Megjelenik évente négyszer. 91/4 szám, XVIII évfolyam. Ára 1991: 15 ft. 1992: 30ft. Kiadja a Magyar Eszperantó Szövetség, Szentháromság tér 6, H-1014 Budapest. Felelős kiadó: Princz Oszkár. Készült a MESZ Sokszorosítóban: hearota 91-000 Kiad. eng. szám: III/FJ/30/1976; ISSN 0230-1318.

Terjeszti a Magyar Posta. Előfizethető bármely hírlapklézbesítő postahivatalnál, a hírlapklézbesítőknél, a Posta hírlapüzleteiben és Lapellátási Irodánál (HELIR), Budapest, XIII, Lehel u. 10/a, 1900 – közvetlenül vagy postautalványon, valamint átutalással a HELIR 215-96162 pénzforgalmi jelzőszámmra.


La vulpo kaj la masko



La vulp' surkampe maskon trovis, ĝin ĉiufranken turnis, ŝovis,



kaj diris kun rikan' acerba "tre bela kapo, sed sencerba"



kaj diris kun rikan' acerba "tre bela kapo, sed sencerba".



Versoj: K.Kalocsay
Muziko: K.Smidéliusz

Muziknotoj: Esperantina Mirska



de Martin Weichert, Munkeno, Germanio.



La museto, kiu superis la lupon.

Iam sur la flora kampo vivis leporido kun sia patrino. Ili feliĉe kuregadis inter la floroj kaj herboj. Iun tagon la leporido kuris tro malproksimen kaj perdiĝis. Baldaŭ vesperiĝis kaj malvarma vento susurigis la foliojn de la arboj. La leporido ege ektimis. Ankoraŭ ĝi neniam pasigis sola la nokton fore de la familia dometo. Apud la flora kampo estis densa arbaro, kie loĝis la timiga lupo. Ĝia panjo ofte rakontis pri la lupo. Kio okazos, se la timiga lupo ekvidos ĝin? Certe ĝi estos formanĝota. La leporido kaŝiĝis malantaŭ arbusto kaj amare ploretis. La ploron ekaŭdis la malgranda museto. Kial vi ploras? - demandis la muso.

— Ĉar mi timas pro la lupo.

La malgranda museto laŭte komencis ridi.

— Ĉu vi timas ĝin? Ja, la lupo estas stulta besto. Ĉu vi volas vidi, kiel mi superas ĝin?

— Ne! Ne! Mi ege timas.

Ilian babiladon ekaŭdis la timiga lupo kaj venis al ili.

— Kiu kuraĝis menciŭ mian nomon? Mi tuj disŝiregos tiun.

— Mi — eksaltis la malgranda museto — Ja mi estas pli forta ol vi.

— Hi - hi - hi! — ridegaĉis la lupo — tion mi ne kredas.

— Amiko, proksime al ni ĉe la vojkruciĝo estas fosita profunda kavo. Ni ensaltu ĝin kaj kiu unue elrampos el la kavo, tiu estos la plej forta.

La lupo konsentis. Ili iris al la vojkruciĝo kaj ensaltis la profundan kapon. La lupo vane saltadis kaj rampis, sed ne povis eliri el la kavo. La malgranda museto serĉis radikojn de arboj kaj kreskaĵoj. Per ilia helpo ĝi rapide elrampis lasante tie la stultan lupon.

Apati Kovacs Bela.




VORTKLARIGOJ

susuri: nature flustri
amare: kun malbona sento
arbusto: eta malalta arbo

disŝiri: tiri en pecojn.
rampi: iri sur la genuoj
kavo: truo en la tero
radiko: la suba parto de planto.

HOVHANES TUMANJAN

MENSOGULO



Estis iam reĝo. Foje la reĝo proklamis en sia lando:

”Kiu mensogos tiel, ke mi diru tio estas mensogo, al tiu mi donos la duonon de mia regno”.

Venis iu paŝtisto kaj diris:

”Longan vivon al la reĝo! Mia patro havis bastonegon, kiun li etendis kaj miksis per ĝi stelojn en la ĉielo.

”Tio povas okazi,” respondis la reĝo. ”Ankaŭ mia avo havis ĉibukon, kies unu finon li metis en la buŝon kaj la alian etendis kaj ekbruligis de la suno.”

La mensogulo foriris gratante al si la kapon. Venis iu tajloro, kiu diris:

”Senkulpigu min, reĝo, mi devis pli frue veni, sed malfruiĝis. Hieraŭ multe pluvis, fulmoj eksplodis, la ĉielo disŝiriĝis kaj mi iris por fliki ĝin.”

”Vi bone faris,” diris la reĝo: ”sed vi malbone flikis. Hodiaŭ matene denove iom da pluvo falis.”

Ankaŭ la tajloro foriris.

Eniris malriĉa vilaĝano kun mezurpoto sub la brako.

”Kion vi volas povrulo?” demandis la reĝo.

”Vi ŝuldas al mi unu mezuron da oro, kaj mi venis por preni ĝin.”

”Unu mezuron da oro?” ekmiris la reĝo: ”Vi mensogas, mi oron ne ŝuldas al vi.”

”Se mi mensogas, donu al mi la duonon de Via regno!”

”Ne, ne, vi pravas!” ŝanĝis sian vorton la reĝo.

”Nu, se mi pravas, donu al mi la mezuron da oro.”

*Tradukisto: Arakeljan Karine.
Pentristino: Kabaskaljan Karen.*

VORTKLARIGOJ:

mensogulo: persono, kiu ne diras la veron.

proklami: laŭte, pompe kaj publike diri.

paŝtisto: ŝafo- aŭ besto-prizorgisto.

ĉibuko: popola pipo, kun tre longa beko.

fliki: ripari per fadenou kaj kudrilo

ŝuldi: devi pagi al iu.

**Popolrakonto
el Armenio**

DONACO EL STRASBURGO

La trajno el Calais estis kovrita de nomoj. Strasburgo - Bazelo - Innsbruck - Salzburgo - Vieno - Budapeŝto - Bukareŝto.

Mi staris apud mia vagono kaj rigardis la plakaton, pensinte, kiel neŝange-
maj la Grandaj Eŭropaj Ekspresoj estas. La fajfilego eksonoris. La trajno eks-
tartis.

Mi manĝis en la restoracio-vagono kaj revenis en la vagonon. Ĝi estis plen-
ŝtopita de francoj. Ili estis legintaj *Paris Match* kaj *Paris Soir* kaj *Figaro*. Mi ek-
dormis kaj vekigis jam nokte. Ĉiuj francoj foriris, krom unu maljuna viro, kun
grandegaj rufetaj lipharoj. En la rako super lia kapo estis ega ligna skatolo. Ĉu
komercisto? Ĉu-floristo? Ĉu en la skatolo estas korpo, bombo aŭ begonio? Ta-
men li aspektis trankvile, akurate, fumanta pipon. Ni kapsalutis unu la alian.
Ial mi ĝojis lin vidi, observi lin. Finfine, mi pensis, ekzamenante liajn belajn
lipharojn, mi estis eŭropano ankaŭ.

"Kie ni estas?" mi demandis france.

Li eligis el la buŝo sian pipon kaj kapneis. Mi provis paroli germane: "Ĉu ni
estas en Francio, Svislando, Aŭstrio, Hungario aŭ Rumanio?"

"Ni estas en Francio ankoraŭ," li diris: "Baldaŭ ni estos en Strasburgo."

"Ĉu vi estas el Strasburgo?" mi demandis.

"Ne," li diris: "Mi loĝas en Douai. Mi veturas al Strasburgo por ĉeesti la fo-
iron."

"Sed vi estas germano."

"Jes. Sed tio estas alia afero. Tio estas en la pasinteco. Nun mi bredas kel-
kajn malgrandajn animalojn por la Strasburga foiro. La foiro en Strasburgo es-
tas mirinda, oni devaa ĝin vidi por kredi. Speciale la sektion de la malgrandaj
animaloj."

Mi ekrigardis la skatolon super lia kapo. Li ekridetis kaj kapjesis "*Kanin-
chen*" li klarigis. Mi ne sciis tiun vorton. Mi almovis mian valizon, malfermis
ĝin kaj elingigis mian vortaron. *Kaninchen*, Kunikloj. "Jes, jes," mi diris.

"Jes, ĝuste," li ekkriis. Li estis tiel ĝoja, ke li prenis la brilan antikvan skato-
lon, malfermis ĝin kaj de tie elsaltis la kunikloj.

Ni nutris ilin per laktuko kaj karoto kaj duono de malnova sandviĉo, kaj
poste metis ilin reen en la skatolon, la trajno malrapidiĝis, kaj tio estis Stras-
burgo.

"Bonŝancon kun la kunikloj," mi diris, premante lian manon. Mi ekdormis
denove. Hazarde ia bruo vekis min. Kelkaj doganistoj staris en la brila lumo.

"Kie mi estas?" mi demandis hispane.

"Svislando," la oficiro diris: "Ĉu vi havas ion por imposti?"

"Nenion," mi diris.

"Neniajn cigaredojn, alkoholon aŭ silkon?"

"Ne," mi diris.



”Ĉu tiu valizo estas via? Ĉu licas malfermi ĝin?”

”Jes,” mi diris.

Ili malfermis la valizon kaj iu fajfis.

”*Kaninchen*,” li diris, ”Vere, belega kuniklo. Tiel. Ĉu oni devas imposti, sinjoro kapitano?”

Mi eksaltis kaj mire ekvidis la kuniklon.

”Tio ne estas mia *kaninchen*” mi ekkriis: ”Tio estas por la Strasburga foiro.” Mi eksplikis mian historion.

”Mi malfermis la valizon por ekscii pri la vorto,” mi diris: ”kaj ĝi, verŝajne, saltis sub mian ĉemizon.”

”Vi havas britan pasporton, ĉu?”

”Jes,” mi diris.

”Tiam ĉio en ordo,” la kapitano diris:

”En la Grandaj Eŭropaj Ekspresoj, se nenie plu, la anglo estas senriproĉa ĝentlemano.”

”Dankon,” mi diris. Li donis al mi la paperfolion kaj subskribis ĝin. Post kelkaj horoj denove lumigis. Altkreska viro en griza kostumo envenis en la kupeon kaj riverencis:

”Bonan matenon,” li diris: ”Bonvenon en Aŭstrio. Ĉu vi havas ion por imposti?”

”Kuniklon!” mi respondis kaj etendis la paperfolion al li. Li ekrigardis, re-donis ĝin al mi kaj denove riverencis.

”Mi esperas vi ambaŭ agrable pasigos vian tempon en Aŭstrio.”

”Dankon,” mi diris. Mi sentis, ke Aŭstrio plaĉos al mi. Tagmeze mi alvenis Salzburgon. Mi sentis min ege laca. Mi trovis la hotelon apud la stacidomo.

”Mi havas kuniklon: *kaninchen*” mi diris al la edzino de la mastro, malfermante mian valizon.

”Tio estas tre bela *kaninchen*.” ŝi diris.

”Ĝi fariĝos tre bona hejmobesto” mi diris: ”Mi donacas ĝin al vi. Ŝi forportis la kuniklon. Mi supreniris. Mi sin banis, sin razis, iom dormis kaj poste subeniris en la manĝoĉambron.

”Jen via tagmanĝo,” la edzino de la mastro diris: ”kaj Dio donu al vi bonan apetiton.” Ŝi metis la odorantan manĝaĵon sur la tablon. Mi komencis manĝi, sed poste demetis mian forkon; la gusto ŝajnis konata al mi.

”Bonvolu,” mi demandis la virinon: ”Kiel tiu manĝaĵo estas nomata?”

Ŝi miris: ”Sed tio estas kuko kun kuniklo!” ŝi respondis.

El la angla tradukis Peter Savolainen.

Kohtla-Jarve, Estonio

RECENZO:

Petras Cvirka:

Koko kantisto kokerikisto

Miaj du gefiloj estas denaskaj esperantistoj, do mi ĉiam klopodis akiri por ili la plej eminentajn esperantajn fabel-librojn. Unu el ili estas *Koko kantisto kokerikisto*. Jam ĉe la komenco kaptas la leganton ĝia ludema flua stilo, kiu kun muzikaj ritmo kaj rimoj faras ĝin facile legebla kaj multe helpas lerni ĝustan akcentadon. Ĝia vortprovizo estas nekutime riĉa. Ĝi babilas al la infanoj, kiel tradicie en naciaj lingvoj. Kelkaj esprimoj estas tiom plaĉaj kaj trafaj, ke ili restis familiare uzataj ĉe ni. Ekzemple; "Tuj, tuj! Mi jam akriĝas la hakilon"! (do mi estas preta fari ion). "Bapti la kapon per io" (forte bati la kapon). "Havi da ĉio plenmanon" (esti riĉa). "Ĉu via kapo estas renversita?" (ĉu vi perdis la prudenton?).



El tiu libro ni ekscias kiel parolas la bestoj esperante: "ko-ki-ko" "kut-ku-da-kut", "gru-gru" kaj tiel plu. Ankaŭ la historioj estas interesaj kaj nekutimaj. Kiam mi eklegis tiun libron, ĝis la lasta litero mi ne povis demeti ĝin. Ne mankas la morala kaj praktika instruoj. Unu aferon mi tamen ne povas laŭdi. La rolantoj de paĝo al paĝo ci-diras unu la alian. La ci-dirado neniam enradikiĝis en parolata Esperanto. Tiun etan makulon mi korektas, kaj anstataŭ "ci" mi ĉiam legas "vi". Krom la verkisto ankaŭ la tradukisto meritas varman gratulon, ja la esperanta teksto montras la talenton de Adomas Vaitilavičius. La petolaj bildoj de Taida Balčiunaite estas belaj kaj konformaj al la fabeloj.

Resume: en sia kategorio mi ankoraŭ ne trovis esperantan libron kun la sama alta nivelo. Kiu deziras koni vivan Esperanton, nepre devas ĝin aĉeti.

Ladislao Vizi, Budapeŝto.

KOLOROJ

Mi konas kolorojn.

Blanka estas ŝaŭmo mara,

Verda estas musk' arbara,

Flava estas vakso pura,

Ruĝa estas ber' matura.

Blua estas flor' cejano

Bruna — kverka frukto — glano.


Lila estas kamp' erika

Nigra — mia kato Mika.

Elvira Lippe, Latvio.

La plej famaj markoj

Laŭ enketado farita de iu usona firmao en San-francisko al 9000 konsumantoj el Usono, Eŭropo kaj Japanio, la dek plej famaj markoj de la mondo estas: 1. Coca-Cola 2. Sony 3. Mercedes Benz 4. Kodak 5. Disney 6. Nestle 7. Toyota 8. McDonald 9. IBM 10. Pepsi-cola.



Unu-minuta kalejdoskopo


En la ĉiutaga vivo ofte aŭdiĝas; "Atendu unu minuton!" Unu minuto ŝajnas tute ne grava. Sed ĉu vi scias, kiom da eventoj okazas en unu minuto en la mondo?

En unu minuto:

- fulmotondras en 30 lokoj,

- fumantoj konsumas minimume 3 tunojn da tabako,
- minimume 5000 beboj naskiĝas,
- minimume 3000 homoj mortas,
- 50 tunoj da salo konsumiĝas,
- 2 milionoj da funtoj da sukero estas foruzitaj,
- okazas minimume unu sinmortigo aŭ murdo,
- la monda loĝantaro fortrinkas 600 mil tasojn da kafo kaj bruna teo,
- okazas 3500 krimoj,
- 50 mil ovoj estas formanĝitaj,
- 100 mil funtoj da viando estas formanĝitaj,
- konsumiĝas minimume 500 mil glasoj da biero,
- miliono da homoj turismas,
- pli ol 2000 krimuloj estas arestitaj,
- la tergloba veturas ĉirkaŭ la suno mil mejlojn.

El El Popola Ĉinio.



TRIA INTERNACIA KORESPONDA GO-TURNIRO

EGLI (Esperantista Go-Ligo Internacia) alvokas ĉiujn Go/Vejĉi/Baduk-ludantojn esperantistajn partopreni en la mond vasta Tria Internacia Koresponda Go-Turniro. Ĝi komenciĝos en januaro 1992. Interesuloj bonvolu enskribiĝi ĉe la turnir-gvidanto: S-ro Matthias Reimann, Platz der Freiheit 20, D-0-5503 ELLRICH, Germanio

MIA AVO

Estas trankvila vespera horo. Mi staras en tombejo antaŭ la tombo de mia avo. Sur la tomboŝtono mi legas: **GEORGO BUKELO, naŭdek jaroj, dek monatoj.** "Naŭdek jaroj" mi pensas: "kiom longa vivo". Kelkaj memoroj trapasas mian cerbon.

Jes, mi konis mian avon nur kiel sveltan grizharulon. Tra rondaj okulvitroj li afable rigardis nin. Dum rideto montriĝis lia malkompleta dentaro. La precipa tasko en liaj lastaj jaroj estis gardi la genepojn, min kaj miajn multajn gefratojn. Dum miaj gepatroj laboris en la kampoj de nia bieneto aŭ prizorgis en la stalo la bestaron, li promenis kun ni tra la naturo, apogante sin sur bastonon. Per la alia mano li kondukis la plej malgrandan nepon: Ni pli grandaj infanoj ludante akompanis lin. Ofte ni plukis florojn, kaptis-papiliojn, saltis sur unu piedo kaj skribis en la sablan vojon figurojn kaj vortojn; foje postkurante unu la alian ni ĉirkaŭis nian avon. Ĉar li ege malbone vidis, li daŭre ion demandis: "Kio kreskas tie? Kion plantis la najbaro aŭ la patro tie ĉi?" Ni iom pli aĝaj gefratoj volonte respondis kaj la malgrandaj tiamaniere lernis ek-koni la diversajn plantojn. Ĝoje kaj malsate ni revenis al la hejmo, tuj rakontante ĉion novan al niaj gepatroj.

Dum malbona vetero ni devis paŝigi la tagon en la loĝĉambro. La avo sidis en angulo en plektita korbseĝo, antaŭ si la infanĉareto kun bebo ene. Per sia naztuko li forpelis muŝon, kiu povus ĝeni la pacan dormadon de la etulo. Per la alia mano li daŭre tien kaj reen movis la infanĉareton, por ke la bebo sentu sin agrable; Ni aliaj serĉis distron en diversaj ludoj, kiujn ni ofte mem inventis. Ni ŝanĝis nian loĝĉambron en grandan reĝan palacon. Seĝoj unu super la alia au eĉ sur la tablo, kovritaj per grandaj tukoj tuj donis al ni la impreson de impona kastelo, grandega pordo aŭ salono. Vestitaj en ŝuoj kaj roboj de niaj patro kaj patrino, tramarsante 'nian' salonon, ni plenavoĉe kantis. *Al salono en Ropropo / homoj paŝas centmiloje!*

La nombron de cent mil homoj ni preskaŭ realigis per senlaca kontinua en-kaj elpaŝado.

Ĉar nia avo ne nur malbone vidis, sed same malbone aŭdis, li neniam insistis,



ke ni estu pli trankvilaj. Tio plaĉis al ni. Estis tute malgrave por ni, du aŭ tri-foje ĉiam pli laŭte ripeti frazon al li, kiam li ne komprenis. Kun plezuro li observis niajn ludojn.

Iun tagon ni demandis la patrinnon, kial la avo restis en la lito. Ŝi diris, ke li estas laca kaj malforta. Ekde tiu tago ni vizitis lin en lia ĉambro: Kelkafoje li petis malfermi la ŝrankon. "Supre, sur la dekstra flanko, staras skatoleto. Alportu ĝin al mi!" li diris, kaj li donacis al ni dolĉajn ruĝetajn frambo-bombonojn. Tiel pasis kelkaj monatoj. Iun matenon nia patrino vekis nin kun ruĝaj okuloj kaj en nigraj vestoj. Ŝi diris al ni: "Via avo ne plu ekvekiĝos. Li nun por ĉiam dormos". Ni sentis la malĝojan atmosferon. Nur flustrante ni interparolis ĉe la tablo. Poste la gepatroj kondukis nin en la ĉambron de nia avo. Pale, kun fermitaj okuloj kaj blanka tuko ĉirkaŭ la kapo, li — kvazaŭ dormante — kuŝis tie. Ni preĝis kune kun niaj gepatroj. La tutan tagon venis najbaroj kaj aliaj vizitantoj. Eĉ dum la nokto ili sidis ĉe kandela lumo kun laŭta preĝado. La postan tagon du ĉevaloj forportis sur ĉaro nian avon en ornamita ĉerko, sekvata de multaj nigre vestitaj homoj. Ni infanoj plukis florojn kaj ĵetis ilin en la tombotruon kiel lastan saluton.

Floroj,... Iom post iom mi vidas florojn ĉirkaŭ mi. Malrapide mi vekigis el mia pensado. La oraj literoj sur la tomboŝtono brilas en la vespera suno, kiam mi forlasas la tombejon.

Rita RÖSSLER, Germanio.

Ŝerco el Nigero:

KONSENTO.

FILO: Paĉjo! Mi havas interesan ideon.

PATRO: Jes, kio ĝi estas?

FILO: Unue, certigu min pri via konsento.

PATRO: Certigita!!!

FILO: Mi planis edziĝi.

PATRO: Edziĝi? Ha! Ha!.....HO! Tre bona ideo. Kiu estas ĉi tiu bonŝanca knabino kiun vi deziras edziĝi?

FILO: Ho! Ŝi ne estas knabino, estas via panjo, paĉjo.

PATRO: Mian patrinnon?

FILO: Jes, paĉjo, via patrino; Mi sekvas vian ekzemplon. Vidu, vi edziĝis al mia patrino!

Charles Ezingabaya, Iwo, Nigero.

AŬSTRALIA LUDO de 'SERPENTOJ kaj ŜTUPETAROJ'

49 IRU MALSUPREN ↓ KVAR NAŬ 48	50 KVINDEK 47	51 VI ESTAS BIRDO: EK-FLUGU HEJMEN KVINDEK UNU 46	52 KVINDEK DU 45	53 KVINDEK TRI 44	54 DANGERO! SUPRENIRU VIN RE-TURNU AL KVINDEK DU. KVINDEK KVAR 43	55 MAL-SUPRENIRU ↓ KVINDEK KVIN 42	56 HEJMO! KVINDEK SES 41
KVARDEK OK 33	KVINDEK SEP 34	KVARDEK SES 35	KVARDEK KVIN 36	KVARDEK KVAR 37 VI ESTAS EMUO: KURU AL LA KVARDEK-TRIA LOKO 38	KVARDEK TRI 38	KVARDEK 39	KVARDEK UNU 40
TRIDEK TRI 32	TRIDEK KVAR 31	TRIDEK KVIN 30	TRIDEK SES 29	TRIDEK SEP 28	TRIDEK OK 27 VI ESTAS KANGURUO: SALTU TRANS DU KVADRATOJN DUDEK SEP 26	TRIDEK NAŬ 26	KVAR 25
IRU SUPREN ↑ TRIDEK DU 17 VI ESTAS ORNITORIN-KO: NAĜU TRANS LA DEK SEP	TRIDEK UNU 18 18	TRIDEK 19	DUDEK NAŬ 20 TUJ IRU ANTAŬEN DU PAŜOJN DUDEK 13	DUDEK OK 21 IRU MALSUPREN DUDEK UNU 12 JETU LA SESON, AŬ REIRU AL LA STACIDOMO. DUDEK DU 11	DUDEK SEP 22	DUDEK UNU 23	DUDEK KVIN 24 VI ESTAS KOALO: GRIMPU LA ARBON. DUDEK KVAR 9
DEK SES 16	DEK KVIN 15 ESTAS IES NASKO-TAGO: IRU TUJ AL 20 POR DONO. DEK KVIN 14	DEK KVAR 14	DEK TRI 4 IRU SUPREN KVAR 13	DEK DU 5	DEK UNU 6 RETRO-IRU TRI PAŜOJN. SES 7	DEK 7	NAŬ 8 STACIDOMO ATENDU UNU YICON. (VIA TRAJNO MAL-FRUAS) OK 8
EK! 1	DU 2	TRI 3	KVAR 4	KVIN 5	SES 6	SEP 7	OK 8

LUDO SENDITA EL LA FORA AŬSTRALIO DE S-INO JEAN LEHANE EL TOOWOOMBA.

Koran dankon pro la ludo, kaj la akompana donaco al Juna amiko.

AMUZE LUDU KAJ RENKONTIGU KUN LA AŬSTRALIAJ BESTOJ!

PACINFANO

Jen, denove la sireno aŭdiĝas. Mi devas rapidi al la rifuĝejo. Komence de la lerneja jaro ni unue devis lerni pri la lerneja rifuĝejo. Estis amuze koni la novajn lokojn: ni esploris la grandajn rezervujojn kun la akvo, malantaŭ kiuj la aranejaĵo luliĝis. Estis amuze progimpi al la tri-etaĝaj litoj de la subtarea rifuĝejo.

Kroata TV iutage donis instrukcion, ke ni preparu sakojn por rifuĝejo: Oni instruis al ni kiel kondukti, en kazo se estos aeratako al nia urbo. Mia tuta familio kaj mi kredis pri la racio de la atakantoj: certe trankviliĝos la konfliktoj. Certe oni ne atakos la ĉefurbon! Kaj ni daŭrigis vivi relative normale... Estis demanĉo kiam en Zagreb la unuan fojon anoncis sin sireno.

Mi estis en mia hejmo kaj rigardis TV. Mi aŭdis iun strangan sonon en la aero. La sono daŭris. Mi ekstaris kaj iris al la balkono: tie mi vidis multajn homojn kiuj kiel formikoj rapidis al la domoj kaj kriis: Alamo! Alamo!

Ni ekridis unue ĉar estis amuze vidi ilin. Tiam mi memoris kion mi devas fari. Kompreneble, mi tute ne havis preparitan sakon por rifuĝado! Rapide mi enkuris en la deponejon, kaptis tre grandan sakon kaj komencis ŝovi en ĝin akvobotelon, dukilograman sakon kun faruno, giston kaj iujn konservafajojn (sen malfermilo, kompreneble). Nur poste mi komprenis, ke mi ekpisis min maltaŭge kvazaŭ mi ekvizitis Lernejon por komentantaj kuiristoj. Rapide mi kurtenfermis la fenestrojn, kaptis litkovrilon, forgesis malfunkciigi la gaskondukiilon kaj mi rapidis en la rifuĝejon de nia loĝejo. Estis multe da plorantaj infanoj. Plenkreskuloj nervozigis. Mi klopodis trovi la plej konvenan lokon, pensante pri tio, kie estas la resto de mia familio. Subite eniris mia patro, kiun la sirensono trafis stratmeze kaj li iel-tiel direktiĝis hejmon. Panjo estis ĉe la avino. La frato forbiciklis en la nekonatan direkton. Bonŝance - la sireno reaŭdiĝis. La urbo ne estis bombardita. La frato revenis lacega: li kaŝiĝis en iun rifuĝejon en la alia parto de la urbo kie li ricevis la taskon anstataŭ biciklo - funkciigi per pedaloj aerpurigigan maŝinon!

Post tiu unua sperto plioftiĝis la alarmoj. Mi preparis mian rifuĝejan sakon sen vana faruno kaj gisto!

En la rifuĝejo mi konatiĝis kun multaj infanoj kaj vidis tre belajn blujajn okulojn... kiuj poste malaperis ien. Por la infanoj en la rifuĝejo mi organizis apartan tempopasigilon: artan nodbindadon! Aro de kurbiĝintaj infanoj ion umis super siaj fadenoj. Post kelkaj horoj en la rifuĝejo ĉiuj infanoj de la regiono jam portis siajn fadenajn braceletojn. Sed ankaŭ tio ektedis. La infanoj komencis nervozigi. La politiko fariĝis nia ĉefa temo. Aĉe! Tiuj kiuj atakas nin, disponas pri nia tempo! Ni volas ribeli... Sed kion ajn ni entreprenas - subite reatdiĝas la sireno kaj nin retiriĝas en la zagrebajn subtorejojn.

Ĝus finiĝis la sireno. la minaco finiĝis. Mi rapide for el la rifuĝejo por profili ion da tempo pri kiu ankoraŭ ĉiam disponas nur mi!

Estas nokto, trankvila, milda. La ĉielo estas surverŝita per la steloj. La urbo dormas. Subite aŭdiĝas la sireno, kiu anoncas la danĝeron pri la aeratako. Panjo urĝigas min vesti min. Surstrate mi aŭdas la voĉojn de la panikplenaj najbaroj. Unusekunde mi vestas min: mi ja lernis ĉiunokte prepari miajn vestojn apud la lito. Ke mi ne perdu tempon serĉante ĝin, se necese. Ni elkuras en la malhelon. Kune kun la najbaroj ni iras tra la ĝardeno en la kelon de la tria najbaro ĉar nia loĝejo ne havas taŭgan rifuĝejon... Pro la timo kaj maldormo mia stomako kramfiĝis, kaj tremas kvazaŭ ĝi volus elsalti. Najbarino perdis sian sakon kun varmaj vestoj kaj kolektas ilin en malhelo, plorante. Etaj infanoj ploras. Ili timas. Ili ne komprenas kio okazas ĉirkaŭ ili. Kiu estas tiuj homoj, kiuj nin vekas noktmeze, dispelas niajn sonojn kaj pelas nin en la malhelan kelon? Ankaŭ en la malhelan estontecon.

Ankaŭ mi ne scias, sincere dirite. Ankaŭ mi timas pri mia lando, pri mia urbo, pri mia strato, pri mia ĉambro. Tiuj kiuj atakas ne zorgas pri infanoj. Sed infanoj estas senkulpaĵ. Ĝis antaŭ kelkaj monatoj ĉiuj infanoj de diversaj nacioj ludis kune ĉi.

Ni atendas en la malhela, terura kelo. Minutoj pasas, horoj.

Neniam mi pensis, ke mi spertos ion similan.

Kiam ni aŭskultas pri teruraj militoj kiuj okazas malproksime de ni, ni estis foliĉaj, ĉar ili ne okazas tie ĉi. La milito estis io fremda, malproksima.


Nun ĝi minacas al nia estonteco kiel nuboplena ĉielo. Detruis ĝi la vivojn de gejunuloj, elŝaltas la lumon, ĝi blindas pri la malfeliĉoj de la aliaj.

Pezkore ni aŭskultas por aŭdi ĉu baldaŭ ĉesos la minaco. Ne. Nur rafalpafoj en la malproksimo.

Denove mi endormiĝis en la seĝo. El la dormo vekis min gaja bruo de najbaro: finiĝis la danĝero, la aviadiloj foriris, ni rajtas reiri al niaj hejmoj.

Kaj ni reiras tra la mallumo, atentoplene.

Ivana Kranjelić, 16 jara



Ida Stojić, 18 jara

La burdo

Ĝi flugas fide inter floroj
bru-ĝue, iom drole —
bizara burdo kun deĵoroj
en foli-kadraj koridoroj
kaj serĉ-instigaj dolĉ-odoroj,
aktive kaj scivole,

senscie, ke post pruvo-celoj
mekanikistoj trovas
per testoj en la vent-tuneloj,
ciferoj, skizoj kaj modeloj,
ke korpoj forme de bareloj
neniam flugi povas

La burdo estas flug-uniko
sen doktoriĝa tezo,
nenion scias pri logiko,
nek pri necesa lev-tekniko,
kaj malgraŭ fenomenaj diko,
sin pafas for kun pezo.

Trankvila kaj facil-anime
en ĉiutaga rito
ĝi zumas flegme kaj pilgrime
al floraj koroj kis-intime
kaj ŝvele ŝarĝas sin sublime —
ne gravas la gravito.



Bertram Potts
Nov-Zelando

bizara: strangega
drole: laŭ amuza maniero
skizo: desegnita plano
barelo: dika, larĝa ujo
burdo: la plej granda speco da abelo
tezo: scienc-nivela raporto celanta prui ion
rito: kutimo

flegme: kun malmulta parolo
ŝvele: grandige
sarĝi sin: alpreni pezan objekton
sublime: belege, super-bele
gravito: altirforto al la centro de la mondo;
pro gravito, aferoj falas, tamen ne burdoj.

VIOLONKORDO

Temas pri unu metalkordo, kiun mi aĉetis delonge-delonge al mia violono, sed la kordo ekzistas eĉ hodiaŭ. Ĉi tiu kordo sonis triste aŭ gaje, kurte au rapide, kiel tio necesis kaj mi ĉiam eksentis, se ĝi ekehis en ies koro. Mi gardis ĉi tiun kordon eĉ de venteto, ĉar mi sentis, ke iu iam diros: "Ĉu vi ne sentas, kiel milde sonas ĉi tiu kordo?"

Kompreneble mi sentis tion! Jam de semajnoj mi sentis tion, sed mi ne ku-raĝis diri. Sed tiam mi demetis la violonon kaj ekkisis la knabinon, kiu estas mia edzino de tiam.

La violono kaj la kordo akompanis nin ankaŭ en la geedzan vivon. Sed pli kaj pli malofte valoris eksonigi la malnovan violonon, ĝi silentis pli kaj pli sur la supro de la ŝranko, kie ĝi kuŝis surdorse en sia ujo kaj ĝiaj kordoj ekvibris kelkfoje mistere, kvazaŭ la musoj de rememoro ĝin surkuradus.



Poste infana ploro ekbruis hejme kaj la violono ekvavis en plena soleco, kvankam la kordo atendis la arĉon streĉiĝinte, kaj eble ĝi volis akompani la kanton, kiu kaŝigadis milde kaj lule inter la mebloj.

Sed neniu zorgis pri la violono; kiam tamen iu ĝin malfermis, ne mi estis tiu. Mia edzino forigis la maldikan metalkordon kaj diris jenon al la lavistino: "Ja la moŝta sinjoro jam ne violonas, kaj cetere, per kio mi distranĉu la saptabulojn?"

Ĉar hejme ni faris tiutempe sapon en grandaj belaj tabuloj kaj ilin necesis distranĉi per mia kordo... Kompreneble mi tuj rimarkis tion; mi ne riproĉis, ĉar ŝi pravis dirante, ke mi muzikas jam malofte kaj la infanoj bezonas sapon kaj purajn vestojn ĉiutage.

Poste la tagoj pasis super ni. Ne necesas ĉiutage lavi la vestojn de la infanoj, ni ne faras sapon kaj mia edzino jam ne devas distranĉi saptabulojn...

Delonge vi ne violonis," ŝi diris antaŭnelonge, neatendite. "Ĉu per la sapo-
tranĉa kordo?" mi demandis pli ĝeme ol eme, tamen mi deprenis la violonon
kaj ekmiris, ĉar la malnova kordo troviĝis sure.

"Ĝi estas bona kordo; tiam mi tuj remetis ĝin." diris mia edzino; kaj tiumo-
mente, kiam subarĉe la kordo milde eksonis, ni pensis nek pri la sapo, nek pri
la pasinta tempo; ni pensis nur pri la bela kanto, kiu neniam pasos.

Tradukis: István Takacs, Marcali, Hungario.

NIA KRUC-ENIGMA KONKURSO EL 91/2:

El la respondintoj, ni elektis du gajnintojn: unu malpli ol 13-jara, unu pli. Te-
mas pri 10-jara knabino el Governador Valadares, Brazilo kaj 15-jara knabino
Julia Polyakova el Kamĉatka, granda insulo ĉe la Pacifika bordo de Sovet-
unio. Gratulon al ambaŭ. Premioj survojas.



KURIERO D'AMANGOUA


Esperanto-Klubo de Amangua-Koa,
03 B.P. 572 Abidjan
Eburbordo



Kial vi ne amus la katon, kiel vi
amas la homojn?
Miaŭ, miaŭ, miaŭ, diras mia kateto.

Yafi Françoise Dorothée.
13-jara.

Korespondpeto: Vigla grupo de junaj
klubanoj deziras korespondi kun ĉiuj
landoj de orienta Eŭropo:
Klubestro: s-ro Alphonse Diatta,
Dakara Esperanto-Klubo,
B.P. 21231 Dakar - Ponty, Senegalio.



Plej bona kuracilo por la kronprinco

Antaŭ multe da jaroj estis reĝo, kiu havis junan kronprincon. La junulo, kadavre pala kaj malsana, ĉiam kuŝis en la lito. La kortegaj kuracistoj multe klopodis, sed neniu el ili sukcesis resanigi lin. Ja reĝo forte ĉagreniĝis kaj anoncis al la tuta lando por peti efikan kuracilon por la kronprinco. En malpli ol unu jaro la kronprinco prenis ĉiajn medikamentojn valoregajn, sed tio ne helpis.

Iun tagon venis al la palaco dika bonzo, kiu asertis, ke li povos resanigi la kronprincon. Tre ĝojis la reĝo kaj demandis lin, kiujn medikamentojn li enskribas en sian recepton.

La bonzo diris al la reĝo: "Kvin kilometrojn sudoriente de la palaco estas fea monto, kiu altas 300 metrojn. Longa vojeto kondukas al ĝia supro, kie kreskas purpura magia fungo. Se lia kronprinca moŝto manĝos ĝin, li tuj resaniĝos."

La reĝo ekĝojis kaj sendis serĉi la fungon. Sed la bonzo haltigis svingante la manon: "Via reĝa moŝto, la fungo estas propraĵo de feoj, kaj por akiri ĝin la princo devas mem iri tien. Neniu alia povas plenumi la laboron anstataŭ la kronprinco."

La reĝo nur povis konsenti kun la bonzo. Frumatene de la sekvanta tago, apogate de gvardianoj, la kronprinco ekgrimpis la fean monton. En spirego li atingis la monto-supron. Tie li rigardis ĉirkaŭen, sed vidis nenion, krom ŝtonoj kaj arboj. En kolerego la reĝo ordonis aresti la bonzon.

"Ho jes, mi kulpis", la bonzo klarigis kun rideto: "Mi diris tro simple. Se lia kron-princa moŝto ne trovis la fungon, li iru duafoje, triafoje ... Ĉiutage li devas grimpi la monton por serĉi la fungon. Li devas iri tien almenaŭ 50 fojojn, eĉ 100 aŭ 500 fojojn, ĉu en ventopluvo aŭ neĝo, ĉu en varmego aŭ malvarmego. Unuvorte, li neniom devas sin malstreĉi antaŭ akiro de la fungo."

"Se li ne sukcesos en du jaroj?" demandis la reĝo kun duba mieno.

"Dehaku al mi la kapon." Trankvile respondis la bonzo.

"Konsentite. Se la kronprinco sukcesos, mi rekompensos vin per sitelo da oro kaj ĉaro da silkaĵoj."

Tiel la kronprinco ĉiutage grimpis la monton en ajna vetero. Pasis malpli ol tri monatoj, jam la kronprinco reakiris la apetiton kaj ruĝajn pometojn sur la vangoj. Post pliaj monatoj tute resaniĝis la kronprinco.

(El El Popola Ĉinio, n-ro 1. 1990)

Melodio:
nekonata

- La maristo -

Teksto:
Ton Verwoerd



La maristo estas for, li estas for, li



estas for. La maristo estas for, li




vagas tra la stratoj. Kie do tro-



vi-ĝas li, dormas li, ronkas li?



La maristo estas for, li vagas tra la



stratoj.

1. Kie do troviĝas li,
dormas li, ronkas li?
2. Kie do troviĝas li,
trinkas li, kuŝas li?
3. Kie do troviĝas li,
kantas li, krias li?

k.t.p.

El Nederlando



KLUBO DE LEGANTOJ



Sendu ĉiun korespondaĵon rekte al la adreso :
Josef Chvosta, Dr. Horákové 16/268, CS-290 01 Podebrady, Ĉeĥ-Slovakio

NATURAJ SCIENCOJ

Karolo rakontas al siaj kamaradoj: Mi ŝatas librojn pri naturaj sciencoj. En libroj pri zoologio mi ekscias pri diversaj plantaĵoj kaj arboj. Pri bestoj kaj animaloj min informas diversaj geologiaj libroj. Pri la evoluo de la tera surfaco, fundo de maroj kaj firma tero min informas botanikaj libroj. En la kemio estas priskribataj movoj, fortoj, varmo kaj elektro, dum la fiziko parolas pri ŝanĝoj dum brulado, putrado kaj digestado. Elektra kurento trairas tre facile lignajn kaj vitrajn stangojn, dum fero kaj metaloj ĝin entute ne tralastas. Elektro sekviĝas ankaŭ ŝanĝojn de akvo al glacio aŭ al vaporo.

La amikoj aŭsakultis, sed ili ne povis simple kredi ĉion, kion Karolo estis rakontinta. Ĉu vi ankaŭ ne kredas? Skribu al ni, ĉu Karolo parolas ĝuste aŭ ĉu li eraras aŭ trompas? Sendu ankaŭ vian opinion pri tiu rakontado de Karolo!

Animalo: besto, en plej vasta senco. T.e. ne planto, ne mineralo.

Putri: malboniĝi, ŝanĝiĝi pro la efiko de aero, akvo, plej ofte kun malbonodoro

digesti: konsumi, foruzi manĝaĵon en la korpo

surfaco: supro de objekto

kurento: fluo aŭ kuro de elektraj eroj

Oka Printempa Semajno Internacia (PS1)

de la 13a de aprilo ĝis la 20a de aprilo 1992 en Bad Neuenahr-Ahrweiler (Rejnlando)

Ekde 1985 Germana Esperanto-Asocio organizas ĉiujare dum Pasko ferian semajnon sub la titolo: Printempa Semajno Internacia (PSI). En 1991 partoprenis en ĝi ĉirkaŭ 105 personoj, inter ili ĉirk. 30 infanoj. La aranĝo ĉefe direktas sin al la mezaĝa generacio – kun aŭ sen infanoj: sed ankaŭ ali-aĝuloj, kiuj harmonias kun infanoj estas tre bonvenaj.

Kompreneble ĝuste inter la familianoj estas ofte kelkaj, kiuj (ankoraŭ) ne parolas Esperanton. Por ili tial okazos lingvokursoj.

Krome la programon fikso la ideoj de la partoprenantoj; antaŭvidataj estas ekskursoj, slojdado, kantado, ludoj, lumbild-prelegoj ktp.

Sed ĉio sen streĉo! Simpla kunestado kaj babilado daŭre eblos. Konatiĝu kun la belega regiono kaj praktiku Esperanton en feria ĉirkaŭo.

Malgraŭ la tre favoraj kotizoj la domo estas sufiĉe luksa. Ĉar ni disponos pri nur 120 lokoj, laŭeble baldaŭ aliĝu, skribante al la komisiitaj de GEA por PSI:

Wolfgang Bohr, Johannes Kirschweng-Str. 11, D-5483 Bad Neuenahr, Germanio; tel. 02641-4885.

Ne nur en elementaj lernejoj oni instruas Esperanton. Ankaŭ en universitatoj ĝi estas studata. Sube, korea studento raportas pri tute oficiala internacia kurso funkcia en Budapeŝto. Eble post kelkaj jaroj tia kurso allogos niajn nunajn lernejanojn:

EKAS JAM LA TRIA SEMESTRO

Dum la tria semajno de septembro okazis en Budapeŝto la tria sesio de la trijara Internacia Koresponda Interlingvistika Kurso de la Esperanto-fako ĉe la universitato Eötvös Lóránd, kiu komenciĝis antaŭ unu jaro kun dek kvar aliĝintoj. En la unusemajna sesio enhavanta ĉiutage okhoran studprogramon partoprenis 8 gestudentoj el ses landoj: Aŭstrio, Francio, Germanio, Japanio, Koreio kaj Pollando.

Lunde okazis konsultiĝoj pri la studobjektoj de la dua semestro: literaturo, movada historio kaj gramatiko. Marde kaj merkrede sekvis la parolaj ekzamenoj kaj skriba testo pri la lingvo-scio. Post la ekzamenoj oni aranĝis en la merkreda vespero distran programon; en la klubejo 'Esperejo' regis plena internacia etoso inter la trideko da ĉeestantoj. Krom amika babilado, okazis atento-tira poem-recitado de Esperantina Mirska, amuzplena kantado, interesa recitaletto de Choe Taesok pri koreaj kantoj kaj aliaj. Ĵaŭde, vendrede kaj sabate okazis intensivaj prelegoj pri la novaj stud-temoj: semantiko kaj lekskologio (vortoj kaj iliaj signifoj, gvidis d-rino Horváth Katalin), literaturo (Szabó Imre), priskriba grama-

tiko (d-rino Koutny Ilona, d-ro Blazio Vaha) kaj interlingvistiko (la studo de internaciaj lingvoj, d-rino Varga-Hazonits Zsuzsa).

Dum la tuta sesio montriĝis kaj regis senĉesa studemo ĉe studentoj, senlaca instruemo ĉe instruistoj kaj senvelka entuziasmo ĉe ambaŭ. Krome ni diskutis plurajn el la eseoj verkitaj de la studentoj, kaj pensis pri la ideo aperigi kelkajn el ili. La ĉeestantoj hejmeniris kun freŝe ŝarĝita koro kaj studmaterialoj por la nova semestro, kies sesio okazos frue en 1992.

Nova kurso povos eki nur post la fino de la nuna, do plej frue en 1993. Multaj interesiĝantoj pri kurso povos utili; tio helpos certigi, ke venonta kurso okazu, kaj jam tuj post la fino de la nuna. Anonciĝu ĉe:

D-rino Koutny Ilona,
Esperanto-fako de Univ. ELTE/BTK
Pf. 107, H-1364 Budapest.

Verkis Choe Taesok, Koreio

to de la nuna, do plej frue en 1993. Multaj interesiĝantoj pri kurso povos utili; tio helpos certigi, ke venonta kurso okazu, kaj jam tuj post la fino de la nuna. Anonciĝu ĉe:



Kursanoj, instruistoj: la verkinto maldekstre

DRAME, DRASTE PAROLAS LA CIFEROJ!

Plej drameca iam ajn estas nia jara statistiko de la abonantoj. Malaperis la oficiala pera vojo en Sovet-unio, sekve kraŝis la nombro de ricevantoj de 1432 al 209, reduktante nian eldonkvanton je triono. Similkialaj faloj okazis en la sitempa GDR, Ĉeĥoslovakio, Hungario kaj iomgrade en Bulgario. Esperiga kontraŭa tendenco videblas en Rumanio, atingita per kontaktoj faritaj dum la Metodika Seminario de ILEI.

Restarigo de abonantaro en tio, kio iĝos Sovet-unio dependos je pluraj similaj interŝanĝ-aranĝoj, kiujn ILEI klopodos starigi. Ni esperas, ke ni tie jam atingis la nadiron (plej malaltan punkton) kaj estonte ni povos iom post iom restarigi abonantaron sur pli realisma bazo. En Ĉeĥ-Slovakio, pro la ILEI-Konferenco en Bratislavo (1-7 aŭg), nenio malhelpas multnombrian abonadon ĉe ĈEA kaj SEA je tre favora tarifo (50 kronoj kaj malpli por kvantoj).

Male en Bulgario kaj Jugoslavio, kie pro ekonomio kaj politiko respektive, ni timas nadiron antaŭ ni. La reform-eŭropa bildo ne estas tute klara, ĉar la oficiala HELIR peras 135 eksterlandajn abonojn; ni ne povas ekscii kie: verŝajne CS, PL, SU.

Feliĉe ĉiam fortiĝanta okcidento savas nin finance; tie elstaras la kontribuo de Italio kaj Usono en 1991. Ekde 1992 preskaŭ ĉiu pagos abonon, kiu kovros la realajn produkto-kostojn, sekve la buĝeto por la nova jaro estas preskaŭ ekvilibra, sed en kelkaj landoj la pagenda sumo en enlanda mono fariĝos apenaŭ pagebla: ĝi egalos du-tri-semajnojn da salajro. Do, rekresko de la abon-nombro en 1992 ne estas facile imagebla.

En la antaŭa numero ni forgesis anonci, ke en reform-eŭropaj landoj ni ofertas konsiderindajn rabatojn por kvantaj mendoj. Tion la perantoj ja scias. Temas pri Bulgario, Estonio, orienta Germanio, Pollando, Jugoslavio, Kubo, Latvio, Litovio kaj Sovet-unio. Pro tio indas grupigi abonantojn el unu kvartalo aŭ urbo aŭ klubo, prefere en kvantoj de 3, 8, 15, 30 aŭ 60.

KVANTO:	LISTIGITAJ LANDOJ			ĈS	RO
1 aŭ 2 abonoj:	250 forintoj	DM 6	US\$ 4	50 k	120
3 ĝis 7 abonoj:	200 forintoj	DM 5	US\$ 3,50	45 kr	100
8 ĝis 29 abonoj:	180 forintoj	DM 4,5	US\$ 3	35 kr	80
30 aŭ pli:	150 forintoj	DM 4	US\$ 2,50	30 kr	70

leioj

Ne forgesu: la baza okcidenta abono estas nun 12 nederlandaj guldenoj.

ABONANTOJ DE JUNA AMIKO

Lando	1987	1988	1989	1990	1991
Hungario	. 837	. 951	. 873	. 830	. 290
Rumanio 254
Jugoslavio	. . 10	. 102	. 297	. 181	. 250
Sovet-Unio	. 1148	. 1468	. 1666	. 1432	. 209
Bulgario	. 240	. 221	. 252	. 226	. 134
Italio	. . 14	. 18	. 32	. 40	. 119
Usono	. . . 7	. . 28	. . 36	. . 50	. 89
Pollando	. . . 5	. . 36	. . 77	. . 70	. 70
Kubo	. . . 5	. . . 8	. . . 8	. 100	. 61
Togolando	. . . 0	. . . 0	. . . 0	. 51	. 52
Francio	. . . 7	. . 37	. . 44	. . 64	. 49
Brazilo	. . 17	. 31	. 41	. 86	. 46
Svedio	. . . 5	. . 43	. . 32	. . 52	. 45
Germana DR	. 130	. 161	. 180	. 141	. -
FR Germanio	. . 30	. 47	. 32	. 49	. 45
Israelo	. . . ?	. . . ?	. . 1	. . 34	. 42
Belgio	. . . 7	. . 15	. . 16	. . 34	. 38
Britio	. . 18	. . 57	. . 51	. . 49	. 29
Ĉinio	. . . 0	. . . 0	. . . 0	. . 5	. 27
Tanzanio	. . . 0	. . . 0	. . 5	. . 23	. 23
Aŭstrio	. . . ?	. . . ?	. . 9	. . 8	. 19
Estonio	. . . -	. . . -	. . . -	. . . -	. 16
Ĉeĥoslovakio	. 180	. 203	. 220	. 70	. 15
Benino	. . . 0	. . . 0	. . . 0	. 13	. 13
Kanado	. . . 5	. . 8	. . 5	. . 11	. 13
Hispanio	. . . ?	. . . ?	. . 4	. . 18	. 11
Litovio	. . . -	. . . -	. . . -	. . . -	. 11
Ebura Bordo	. . . 0	. . . 0	. . . 0	. 11	. 11
Madagaskaro	. . . 0	. . . 0	. . . 0	. 8	. 11
Norvegio	. . . ?	. . . ?	. . 4	. . 6	. 11
Nederlando	. . 17	. . 11	. . 11	. . 5	. 10
Aŭstralio	. . . 5	. . . 9	. . . 8	. . 11	. 10
Albanio	. . . 0	. . . 0	. . . 0	. . 0	. 8
Zairio	. . . 0	. . . 0	. . . 0	. . 8	. 8
Kamerunio	. . . 0	. . . 0	. . . 0	. . 6	. 6
Koreio	. . . ?	. . . ?	. . 4	. . 4	. 6
Hinda unio	. . . 0	. . . 0	. . . 0	. . 0	. 6
Meksikio	. . . 0	. . . 0	. . . 0	. . 0	. 6
Irano	. . . 5	. . . 5	. . 3	. . 2	. 5
Tra HELIR (landoj nekonataj)					135
Ceteraj	. . . ?	. . . ?	. . ?	. . 5	. 81
Landoj sume	. . . ?	. . . ?	. 33	. 48	. 64
Okcidente 6	. 138	. 311	. 333	. 553	. 603
Tutmonde	. 2725	. 3561	. 4122	. 63800	. 2284

ILEI subtenadas la sendon de ĉ. 240 gazetoj al plej diversaj adresoj tra Afriko, Latin-ameriko kaj Azio. La apuda tabelo inkluzivas plurajn el tiuj landoj. Verkante la enkondukon, mi supozis kaj fanfaronis pri legantoj en kvindeko da landoj. Sed la zorga kalkulo montras jam 64! Sekve ne ĉiuj plu eniras la detalan liston. Kun malpli ol 5 abonoj estas:

Afriko: Senegalio, Ruando, Niĝerio kaj Kongo.

Ameriko: Argentino, Ĉilio, Venezuelo, Urugvajo, Kolombio kaj Peruo.

Azio: Malajzio, Japanio (!), Tajvano (Ĉinio), Tajlando, Pakistano, Nepalo, Singapuro, Mongolio, Vjetnamio kaj Srilanko.

Eŭropo: Finnlando, Islando, Svislando, Greklando kaj Danlando.

Oceanio: Nov-Zelando.

Nia statistiko por 1992 estu ankaŭ drameca! Sed en pli pozitiva senco! Nur dank' al la helpo de ĉiu peranto kaj ĉiu leganto ni atingos tion. Montru kaj reklamu la gazeton, varbu novajn abonantojn! — Dankon!

LA KURIERO DAMANGOUA



Birdoj




BIRDOJ

Se mi perdiĝas
Se mi perdiĝas
sur la vojo,
estas la birdoj, kiuj
bone ridos pri mi.
Se mi perdiĝas
en la rivero,
estas la fiŝoj, kiuj
faros tion. Ho! Ho! Ho!

VIRO



*Benoit SEKA,
13-jara.*



Fiŝoj en la rivero